

Ĉu li bremsis sufiĉe? - de Johán Valano

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-824/293, 1979 julio 26 kaj 28
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-44/SRI-1979-44-A-2-293-824-1979-07-26-28-Claude-kaj-Andree-Gacond-Chu-li-bremsis-sufiche-de-Johan-Valano.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND.

Maloŭte en la esperanto-literaturo libro elĉerpiĝis tiel rapide, kiel la nova krimromano "Ĉu li bremsis sufiĉe?" de Johán Valano. Kelkajn monatojn post la apero de la libro ĉe la eldonejo TK en la kolekto Stafeto jam aperas dua eldono por kontentigi la aĉetemulojn. Ni memorigas, ke la unua krimromano de Johán Valano, "Ĉu vi kuiras ĉine?" ricevis la premion de la plej bona libro 1976 laŭ la konkurso organizita de Literatura Foiro.

A.- Kion ŝatas la legantoj, estas la simpleco de la intrigo de la romanoj de Johán Valano, kaj ĉefe la flueco de lia lingvo. La esperanto-publiko sopiras al vere legeblaj libroj, kaj Johán Valano fine respondas al tiu ĉi sopirado. Liajn librojn oni glutas dum unu aŭ du vesperoj sen esti ŝokita de lingvaj monstraĵoj, kiel tro ofte okazas kun la pli multo de la verkoj originalaj aŭ tradukitaj aperantaj en esperanto.

Cl.- Se oni iom atente analizas la stilon de Johán Valano, oni nur povas malkovri kiom kongrua kun la spirito mem de esperanto ĝi estas. Nenia monotoneco, kiel ĉe la plimulto de la aŭtoroj, pro tre verŝajna ekspluatado de rimedoj, kiujn oni tro tendencas neglekti. Mi donos nuran ekzemplon de la influo de Claude Piron, la vera nomo de Johán Valano, sur la esperanto-vivon svisan. Estis lanĉita antaŭ kvino da jaroj kampanjo titolita "Esperanto en la lernejojn". Nun ĝi agadas sub la titolo "Esperanto lernejen". La tradicia peza formulo -o en la -ojn fariĝis -o -en. Ni ripetas: "Esperanto en la lernejojn", "Esperanto lernejen".

A.- En nia recenzo de "Ĉu li bremsis sufiĉe?" ni neniel raportos pri la rakonto. Al vi malkovri la krimulon kaj intimiĝi kun Vinstrato, kiu ne volas morti. Ni hodiaŭ citos frazojn el tiu ĉi romano, por vin atentigi pri la originaleco de la stilo de Johán Valano. Ni amuziĝos normaligi tiujn ĉi frazojn, por montri kiel ili ĝenerale estus aperintaj en normaj verkoj. Tio komprenigos, kion alportis al la esperanto-literaturo la Valana revolucio.

Cl.- Ni do komencu nian amuziĝon. Mia edzino citos Valanaĵojn:

A.- Stefano okule laŭiris la fluon de Mikva, de ties elmonta apero ĝis la kunfluejo kun Tjazo, kaj li sentis kvazaŭ dankan korvarmon al la prauloj kiuj sukcesis tiel arte ĝin ornamu per juvelaj ŝtonpontoj.

Cl.- Ni tuj rimarkas ĉe Valano la tendencon uzi vortkunmetaĵojn: laŭiris - elmonta - kunfluejo - korvarmon - ŝtonpontoj. Kelkaj estas sufiĉe kutimaj, aliaj estas novaj. Alia Valana tendenco estas la e-vorta abundo. Tiuj adverboj simpligas la frazstrukturojn kaj malpliigas la oftecon de la o-vortoj. En la ĵus citita frazo ni trovas la adverbojn okule kaj arte. Ni ree citas la koncernajn frazerojn:

A.- Stefano okule laŭiris la fluon de Mikva...

Cl.- kaj

A.- ...kiuj sukcesis tiel arte ĝin ornami.

Cl.- Kutimuloj estus skribintaj: Per la okuloj anstataŭ okule, kaj kun arto anstataŭ arte. La adjektivo elmonta estas tipa valanaĵo:

A.- ... de ties elmonta apero ĝis la kunfluejo kun Tjazo...

Cl.- Ni citu alian frazon:

A.- La suroj doloris dum li fine haltis por iom spiri piede de la monto.

Cl.- Denove ni renkontas du e-vortojn: fine, piede. Ĉefe la dua nin interesas, ĉar ĝi montras, ke Valano ne timas vokal-ripetojn :

A.- piede de la monto.

Cl.- Li preferas piede de la monto al ĉe la piedo de la monto. Cetere la tonakcento malakrigas la de-ripeton:

A.- ...piede de...

Cl.- Jen kelkaj aliaj citaĵoj, kie vi rimarku la oftecon de la e-vortoj:

A.- ... La disaj frazoj trafis lin kiel puzleroj, kiujn lia menso klasis interrilatige.. Kiel tia homo povis devojiĝi per aŭto ĵus kontrolita garaĝe...

Cl.- klasis interrilatige ĉe Valano anstataŭas la kutiman klasis farante interrilatojn, kaj aŭto ĵus kontrolita garaĝe estas certe pli malpeza ol aŭto ĵus kontrolita en la garaĝo.

Cl.- Legante verkojn de Valano estas interese rimarki la rolon de la e-vortoj por vigligi la frazritmon. Alia vigligilo estas la emo de la a-vortoj okupi nekutiman lokon. En esperanto la adjektivoj tendencas antaŭiri la ovortojn. Ĉe Valano tre ofte ili postiras ilin. Aŭskultu:

A.- Tiel li eksciis ke Jendrik mortis pro aŭtoakcidento montvoja.

Cl.- La tradicia frazo estus: ... ke Jendrik mortis pro montvoja akcidento.

A.- Li bezonis promeni en la urbo, sorbi ties etoson, antaŭ ol transiri al punktoj pli konkretaj.

Cl.- Tradicie oni dirus: ... al pli konkretaj punktoj. En la sekvanta frazo vi ne nur atentu la adjektivojn, sed la tuton. Ni troviĝas antaŭ tipa Valana formulado, kiu estas tute konforma al esperanto, sed tamen tre nova:

A.- Multaj homfluoj interkruciĝis ĉi tie: turista, dungitula, lernejana, kune kun tiu de la kampanoj kiuj venis urben kaj atendas aŭtobuson por rehejmiĝi aŭ trinkas lastan aperitivon en trotuarkafejo antaŭ ol reaŭti vilaĝen.

Cl.- Rimarkindas la adjektivoj turista, dungitula, lernejana por difini la homfluojn. Nenia monotoneco ĉe Valano, ĉar por la kvara homfluo li rompas kun la a-formo por reveni al la

tradicia de-komplemento: de la kamparanoj. Rimarkindas ankaŭ la en-adverboj urben kaj vilagen.

A.- Je la barel da vino anoncis ŝildo kun malnovstilaj literoj kaj dialekta supersigna skribo tipa pri la Sankta Valo de Tjazo.

Cl.- Johán Valano en ĉiuj siaj verkoj "Ĉu vi kuiras ĉine?", "Malmalice" kaj "Ĉu li bremsis sufiĉe?" iel propagandas por la dialekta supersigna skribo de la Sankta Valo. Lia pseŭdonomo Johán Valano pravas, ke li estas adepto de tiu skribformulo, kiu metas akcenton sur la akcentita vokalo, kiam apostrofiĝis o-finaĵo anstataŭ meti la tradician apostrofon. Povas esti, ke Valano pro la sukceso de siaj romanoj havos imitantojn. Tute certe lia skribpropono estas malpli peza ol la tradicia, pli plaĉa al la okuloj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia pri la nova krimromano de Johán Valano: "Ĉu li bremsis sufiĉe?". Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), oktobro 2013